

Kluba Bulteno

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 4 2017 Vendredon la 3an de novembro 65a jaro

Kalendaro

Ĉiuj vesperaj kunvenoj komenciĝos je la **18a 30.**

Mardon la 7an de novembro (semajno 45) *tirsdag*

La Oktobra Revolucio en Ruslando, tiel nomata laŭ la malnova Julia kalendaro, fakte komenciĝis laŭ la nunuzata Gregoria kalendaro la 7an de novembro 1917. Nun, cent jarojn poste, ni diskutos la sekvojn.

Den såkalte Oktoberrevolusjonen begynte faktisk, etter den moderne gregorianske kalenderen, den 7de november 1917. Nå, hundre år etter, diskuterer vi hva den førte til.

Lundon la 20an de novembro (semajno 47) *mandag*

Internacia Junulara Kongreso (IJK) okazis ĉi-jare por la unua fojo en Afriko. Vd. p.3.

Den internasjonale esperantoundgdomskongressen ble avholdt i år for første gang i Afrika. Se s. 3.

Mardon la 5an de decembro (semajno 49) *tirsdag*

Studkunveno. Ni pludiskutos malnetan tradukon de broŝuro pri malnovaj metioj.

Studemøte. Vi fortsetter å diskutere et utkast til oversettelse av en brosjyre om tradisjonelle håndverksyrker.

Lundon la 18an de decembro (semajno 51) *mandag*

Literatura kunveno. Ĉiuj prezentu iun Esperantan libron (sed bonvenon ankaŭ sen libro).

Litteraturmøte. Alle velger en Esperanto-bok og forteller om den (men velkommen også uten bok).

Mardon la 2an de januaro (semajno 1) *tirsdag*

Esperoj kaj perspektivoj por Esperanto en 2017.

Hvilke håp og perspektiver ser vi for esperanto i 2017?

Kaj ni aranĝas **kromkunvenojn** kiam venas eksterlandaj gastoj.

OKAZIS

Pri la kongreso en Seulo (1.9)

Ni aŭskultis la travivaĵojn de Kjell Peder dum kaj ĉirkaŭ la Universala Kongreso en Koreio kaj rigardis lian kolektojn de bildoj, poŝtkartoj, informkajeroj kaj diversaj aliaj memoraĵoj (ankoraŭ rigardeblaj en Esperantonia).

Post la parlamenta elekto (18.9)

Ni komentis la rezultojn de la ĵusa parlamenta baloto. Kiajn ŝanĝojn ni rimarkus se elektiĝus maldekstra registaro? Tia registaro ni fakte povintus havi se nur la elektosojlo estus ne 4%, sed 3% – aŭ 5%.

Kaj, ankoraŭ tutan semajnon post la baloto, la konsisto de la registaro dependas de intertraktado de pluraj partioj.

Vira kaj virina lingvaĵo (3.10)

Anna Maria rakontis el sia studo pri diferencoj inter vira kaj virina paroloj (en la pola): Viroj kaj virinoj same multe ekparolas, sed virinoj pli longe. Virinoj pli multe uzas -us-formon ol viroj, sed pri imperativo estas inverse. Viroj ankaŭ parolas pli "dece" al virinoj ol inter si.

Kelkaj vortoj estas specife viraj, kaj kelkajn inajn vortojn ni trovis en la norvega – guri, tisse.

Studkunveno (16.10)

Ni daŭrigis nian tradukadon de "Malnovaj metioj" kaj tiel lingve plilertiĝis.

La kurso de Anna Maria bedaŭrinde **ne** okazis, ĉar pro ies malsano pasis semajno ĝis la dissendo de invito, kaj tiam neniu el la interesiĝintoj aliĝis.

Nuntempe la plej multaj novuloj, precipe la junaj, trovas senpagan kurson en la reto (lernu.net aŭ (angle) duolingo.com kaj lernas memstare.

De tempo al tempo ni provas inviti ilin al informkunveno.

UK 2018 , Lisbono

Ni havas kelkajn ekz. de la aliĝilo kaj de la *Unua Bulteno* en la klubejo.

Kromekzempleroj

En la klubejo ni havas ankaŭ grandan kolekton da kromekzempleroj de internaciaj periodaĵoj el la lastaj jaroj: *Heroldo*, *Sennaciulo*, *Literatura Foiro*, *Kontakto* k.a. Senpage preneblaj!

Membrokunveno lundon, 20. novembro

La program-responsulo, Anna Maria Konieczpolska, skribas:

Ĉi-jare Internacia Junulara Kongreso (IJK) okazis en Afriko, en Togolando. Jen estis la unua Esperanta junulara kongreso en Afriko, historia okazo. Organizado de IJK en Afriko estis ja defio. Ĉu venko, ĉu fiasko?

Mi prezentos temon (viroj kan virinoj en siaj kulturoj), fotojn kaj ni babilos skajpe kun ĉeestintoj.

Trilanda renkontiĝo (skandinava kongreso)

En majo venontjare la sveda kaj la dana E-organizoj aranĝos siajn jarkunvenojn en ŝipo vojaĝanta inter Kopenhago kaj Oslo kaj invitas ankaŭ nin norvegojn, (kvankam NEL ne aranĝos landan kongreson venontjare) Vidu *Norvega Esperantisto* 4, p. 5.

Vendredon matene, la 11an de majo, la ŝipo restos kelkajn horojn ĉe-kaje ĉe Vippetangen, kaj ni nun diskutas pri la programo de tiu tago. Provizore ĝi aspektas jene:

7 – 9(.30): Matenmanĝo

10 – 13: ekskurso en Oslo

Gvidata piediro tra la fortikaĵo al la urbodomo kaj gvidado tie.

Ni havas du rajtigatajn ĉiĉeronojn pri Oslo inter nia membroj.

Lunĉo en la urbodoma kafejo.

Eble iuj anstataŭe tramos al la Ekeberg-parko aŭ Vigeland?

13.00: Surŝipiĝo

14 – 17: Jubilea programo por ĉiuj + interkona babilado (3 horoj)

Povos partopreni ankaŭ tiuj kiuj ne kunvojaĝos al Kopenhago, ĝis la 16a.

16 – 19: Jarkunveno de Sveda E-Federacio (3 horoj)

20.30: Vespermanĝa bufedo

Sed ni nun vigle diskutas retroŝte pri la detaloj: Mario (Tromsø – la prezidanto de NEL), la ĉiĉeronoj Cato kaj Birgit, kaj la klub-estrara sekretario Douglas en nia oficejo.

PÅ NORSK *Det svenske og det danske årsmøtet avholdes i mai neste år på Danskebåten, og vi skal stå for en kort omvisning i Oslo.*

Ĉu iu volas lui kunvenĉambron? – leie møterom?

Nia kunvenejo estas ofte neuzata, sed taŭgus por kunvenoj de malgrandaj grupoj aŭ – post rearanĝo de la mebloj – ĝis ĉ 20 homoj. Ekz-e por loka sekcio de tutlanda organizo. Alloga povas esti la rekta eniro el la strato. Ĉu vi konas iujn kiuj bezonas kunvenejon?

Kjenner du noen som kunne være interessert i å leie møterommet vårt for én eller flere kvelder? Eller en helg? Vi trenger leieinntekter! Brosjyre med nærmere opplysninger og bilder kan du få fra kontoret.

Info-budoj en foiroj?

Info-budoj en foiroj k.s. donas bonan sed maloftan okazon renkonti la publikon – precipe junulojn – kaj informi pri Esperanto – kiel ekzemple en la Mela-festivalo (aŭguste ĉiujare). Ofte jun(et)uloj tute ne aŭdis pri ĝi, kaj ne imagas ke tia lingvo povas ekzisti kaj esti uzata.

Sed tiaj konferencoj kaj foiroj ne tre oftas. Foje ili okazas loke, for de la urbocentro, ekz-e en biblioteko. **Se vi scias / aŭdos** pri tia aranĝo, kie eblus starigi informbudon (senpage aŭ malmultekoste), **bv. sciigi tion al ni.**

Viktig: *Si fra om du vet om en messe eller festival e.l. hvor vi kan få satt opp en info-bod eller en liten utstilling. Eller et lokalbibliotek som er mot-takelig. Folk vet ikke at Esperanto finnes!*

Vi bonvenas viziti nian klubejon

en Sinsen ankaŭ kiam ne okazas kunveno. (vd. vojklarigon malsupre)
Tie vi povas

- preni kromekzemplerojn de *Kontakto*, *Literatura Foiro*, *Sennaciulo* ...
- aĉeti kromekz. de bibliotekaj libroj (po 20 kr)
- aĉeti glumarkojn (po 2 kr) – aŭ librojn

Sed antaŭesploru telefone aŭ retpoŝte, ĉar ne ĉiam iu ĉeestas por malfermi.

Kom gjerne innom, men send e-post eller ring på forhånd, for det er ikke alltid noen tilstede.

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18*, 0572 Oslo. Tlf. 22 35 08 94
Tramo 17 al Sinsenterrassen aŭ buso 31 al Rosenhoff aŭ metroo 5 aŭ 4 al Sinsen.
Vd. pli detale interrete ĉe esperanto.no/oslo => "vojklarigo".

* inng. Schouterrassen. www.esperanto.no/oslo Retpoŝto: [oficejo\[a\]esperanto.no](mailto:oficejo[a]esperanto.no)
Bankkonto 0532 36 19699 (sed kotizonu pagu al NEL/*Forbundet* 0533 05 22870).

Ĉi tiun *Bultenon* prizorgis Douglas Draper